Historiaj datrevenoj

En 1909 okazis en Barcelono la 5-a Universala Kongreso de Esperanto (tiam nomata internacia). Ĝin ĉeestis L. L. Zamenhof. La lokan kongresan komitaton prezidis Frederic Pujulà i Vallès, kaj sekretariis Germaine Rebours de Pujulà.



Tiu UK en Barcelono estis granda sukceso, kaj loke kaj internacie. Partoprenis 1287 homoj el 32 landoj. La ĵurnaloj detale informis pri ĝi. Kaj la movado plifortiĝis. Fondiĝis Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kaj poste Kataluna Esperanto-Federacio. Krome, Zamenhof ricevis la plej altan honoron de la hispana reĝo: Comendador de la Orden de Isabel la Católica [Komandanto de la Ordeno de "Isabel la Katolika]; kaj la registaro oficiale permesis, ke oni instruu Esperanton en la oficialaj lernejoj de la lando.

Sed ne ĉio iris glate en 1909. En Julio, laboristoj en la konstruado de fervojo en la hispanaj kolonioj de Maroko estis atakitaj de la lokaj berberoj. Tiel komenciĝis la koloniisma Rif-milito, kiu daŭros ĝis 1927, malgraŭ la pacifisma kaj kontraŭmilita sinteno

de la hispana popola opinio. Dum la riĉuloj pagis por ne esti rekrutitaj, la junuloj de la proletaraj klasoj devis aliĝi por amase morti en Afriko defendante la interesojn de la hispanaj grandaj posedantoj. En Barcelono ekis popola ribelo, gvidata de la patrinoj de tiuj novrekrutitaj soldatoj. Ĝi fariĝos la Glora Semajno, poste konata kiel Tragika Semajno. La aŭtoritatoj konfrontis ĝeneralan strikon kaj surstratajn protestojn kun la eliro de la armeo. Multobliĝis barikadoj kaj incendiaj konstruaĵoj, la urbo iĝis konata kiel *la fajra rozo* [vidu la emblemon de la 92-a SAT-kongreso, kiu memorigas la revolucian historion de la urbo].

La armeo rapide sufokis la ribelon, kaj tuj komenciĝis arbitra kaj ampleksa subpremado. Oni fermis la sindikatojn kaj la laikajn lernejojn. Miloj da homoj estis detenitaj kaj torturitaj, centoj kondamnitaj al ekzilo, dekoj al porviva enkarcerigo kaj kvin al morto. Inter ili, la konata pedagogo Francesc Ferrer i Guàrdia, kiu simpatiis al Esperanto. La internacia kampanjo subtene al la fondinto de la Moderna Lernejo ne sukcesis savi lian vivon.

Jen la historia fono de la barcelona UK. La sieĝostato reganta tiam la landon malpermesis surstratajn manifestaciojn. Pro tio la esperantistaj anarkiistoj el pluraj landoj, kiuj planis grandan liberecanan manifestacion en Barcelono, decidis ne partopreni la esperantan kongreson en la kataluna ĉefurbo. Dume, la hispana registaro uzis ĝin kiel propagandilon de toleremo kaj progresemo por la internacia publika opinio. Siaflanke, la esperantistoj adaptiĝis plurmaniere. Kelkaj bojkotis la eventon. Multaj partoprenis ĝin entuziasme, certigante pozitivan turnopunkton en la evoluo de la movado.

Alia memorinda okazaĵo estas la 14-a SAT-kongreso okazinta en Valencio en 1934. Ĝin partoprenis 376 homoj el 13 landoj, interalie la barcelonano Jaume Grau Casas, kiu interalie prelegis pri sia konstruata *Hispana Antologio*, kaj dediĉis poemon al la evento: *Saluto de gasto*. Tiun kongreson organizis Luis Hernández Lahuerta, kiu anekdote kundividis plurajn aferojn kun Pujulà. Ambaŭ tradukis pecojn de la verko *Don Kiĥoto de la Manĉo*; kaj ambaŭ aktivis kulture pri sia denaska katalun/valencilingva lingvo. Dum la Hispana Milito, Hernández Lahuerta famiĝos kiel redaktoro de la revuo *Popola Fronto*; kaj ekde 1947, post sia liberiĝo el la karceroj de Franko, li sekretarios Hispanan Esperanto-Federacion, kaj redaktos ĝian bultenon: *Boletín*.

Fakte, en 2019 oni ankaŭ memoras la okdekjariĝon de la fino de la milito en Hispanio kaj de la tiama socia revolucio (1936-1939). Temas pri grava datreveno kaj al ĝi la kongreso dediĉos plurajn programerojn. Estas bona momento por kune pripensi tiujn aferojn en la ĉiam pli zorgiga internacia kadro. Tiurilate, alia substrekinda evento okazis en 1986 en Sant Cugat del Vallès, apud Barcelono. Temas pri la 59-a SAT-kongreso, organizita de la karmemora Ramon Manau Torres, el Sabadell, fidela SAT-ano kaj bonkora homo. Bonŝance, unu el la tiamaj prelegantoj ankoraŭ

vivas, Eduardo Vivancos (Barcelono, 1920). Ni homaĝas lin kaj tiun generacion de pacistoj kontraufaŝistaj, kiuj paradokse devis batali por la libero kaj pro tio suferis koncentrejojn, ekzilon kaj la subpremado de longa diktaturo.

En tiu historia itinero menciindas ankaŭ la SAT-kongreso de 2002 en Alikanto/Alakanto, organizita de la liberecana kamarado Marteno Bustín. Tie estis fondita SATeH. Kelkaj el la tiamaj prelegantoj estis Zofia Banet-Fornalowa pri la familio Zamenhof, Miguel Fernández pri la poezio de Federico García Lorca, kaj Tatiana Auderskaja pri Vasilij Eroŝenko. Krome, teatrumis Jerzy Fornal.

Fine, menciindas grava sukceso de la laborista lukto: La Kanada. Post longa striko komencinta en elektra entrepreno en Barcelono dum februaro kaj marto de 1919 [en la bildo videblas virinoj, kiuj atendas por havi iom da karbo dum la senlumiĝoj], la laborista movado atingis per la unua fojo en Okcidenta Eŭropo unu el siaj plej deziratajn celoj, nome la 8-horan labortagon. En la zorgiga nuno indas memorigi tiajn eventojn kaj defendi ties rezultojn.

SALUTO DE GASTO

Saluton varman, el la kor',
al laborista mondkongreso;
al viaj penoj kaj labor'
estu triumfo kaj sukceso.

Voĉ' kuraĝiga jen por vi
de gast'—ĉu tuj kunbatalonto?—
en nuna temp' de dolor-kri',
de bruta fort', faŝisma honto.

Prefere—ruĝo de standard'
flagranta kiel batalsigno,
pli ol perfido de ponard'
mortiga por la homa digno.

Milfoje sanga mortbatal'
por nask' de justa homsocio,
antaŭ ol mort' de l' ideal'
ĉe l' burĝa ideologio.

Kun abomen' mi krias: fi!
al hipokrito de la mondo.
De l' Just' fariĝi volas mi
jam kavaliro-vagabondo!

Jaume GRAU CASAS L. K.

Salonoj

La bonega kongresejo permesas al ni homaĝi multajn antaŭulojn.

Ĝardeno Zamenhof. Lidja Zamenhof (1904-1942) estis la filino de la iniciatinto de Esperanto. Pacifista, baĥaana kaj homarana virino, ŝi alfrontis la nazismon en Varsovio kaj fine estis murdita en Treblinka. Tiu belega ĝardeno memorigas nin kiel oni semis kaj semis cele al unu granda ronda familio.

Ĉefenirejo Lanti. Eugène Adam (1879-1947) estis la fondinto de SAT. Sufiĉe malkonata de la nunaj esperantistoj, karakterizis lin maldogmo kaj malfermo al alies opinioj. Per lia inspiro kaj agado ni eniras en engaĝiginta mondo, kiu celas kunigi per Esperanto tiujn interesitojn en socia transformado.

Salono Grau. Jaume Grau Casas (1896-1950) vicprezidis la Akademion de Esperanto kaj redaktoris la modelan Kataluna Antologio (1925). Ĉefprelegis en la SAT-kongreso de 1934 en Valencio. Verkis en la francaj koncentrejoj *Tagoj kaj Ruinoj*, esperantigita de Miguel Fernández kaj eldonita de SATeH en 2017. Jen la granda salono de la kongreso.

Salono Carbó. Teresa Carbó (1908-2010) estis kataluna instruistino. Kun sia edzo fondis Akademio Enciclopedia d'Esperanto. Kunorganizis la Ruĝan Helpon. Suferis malliberejon. Estis la lasta ano de POUM kiu vidis vivantan Andreu Nin. Ekzilita en Francio, partoprenis la Rezistadon, helpante al fuĝintoj de la nazismo.

Salono Julivert. Maria Julivert (1888-1968) estis instruistino pri pentrado kaj desegnado, kiu atingis postenojn ne oftajn por tiutempaj virinoj. Aktivis en la e-klubo de Andreu Nin. Tradukis al la kataluna lingvo tekston de Zamenhof: *Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*. Ĉefrolis en pionira feminisma movado. Jen la akceptejo de nia kongreso.

Salono Germinal Gracia. Tomás Germinal Gracia Ibars (1919-1991) estis barcelona ekzilito, kiu kune kun Eduardo Vivancos (n. 1920) eldonis la liberecanan *Senŝtatano*. Partoprenis interalie la SAT-kongreson de 1973 en Toronto. Plumnome Víctor García, li verkis tridekon da altkvalitaj libroj pri siaj vojaĝoj. Al li ni dediĉas la kongresan libroservon kaj ties salono.

Koncertejo Berthelot. Paul Berthelot (1881-1910) estis franca anarkiisto, fondinto de la revuoj *Esperanto* kaj *Internacia Socia Revuo*, kaj ankaŭ de la unua societo por kunigi la katalunajn esperantistojn. Entuzisma disĉiplo de la pedagogo, Ferrer i Guàrdia, li klopodis krei liberecanajn komunumojn en Brazilo. Tie li forpasis pro ftizo. Al li ni dediĉas la kaŝitan koncertejan parton de nia ĝardeno.

Konstruaĵo Fratinoj Rosell. Teresa (1872-1954) kaj Eulàlia (1879-1953) estis katalunaj instruistinoj, kiuj multe helpis al Joan Amades (1890-1959) en lia esplorado pri kataluna folkloro. Puŝitaj en mizeron pro la reprezalioj de la faŝistaj regantoj post la fino de la milito, ili mortis en azilon por malriĉuloj. Eulàlia aŭtoris la devizon de Kataluna Esperantista Federacio: “Maro estas gutaro”. Teresa estis socia kaj kultura aktivulino dum pli ol tridek jaroj, ĝis la alveno de la faŝista reĝimo. Membris en la unua estraro de la loka e-asocio en Vilanova i la Geltrú, fondita en januaro 1909: *Laboro Esperanta*. Ambaŭ premiiĝis en la Internaciaj Floraj Ludoj.

Konstruaĵo Trini Garcia. Infanaĝe Trinitat Garcia (1918-2017) kun ŝia familio migris perŝipe el Murcio al Katalunio, la patro piede kun la kaprinoj. Ŝian edzon, poumistan instruiston de Esperanto, oni murdis dum la Retiriĝo (1939). Ŝi suferis sub la diktaturo pro ruĝulino. Verkis *Mia vivo, mia granda batalo* [ŝia filo] *kaj mia subteno* [Esperanto].

Kinejo Monrás. Concha Monrás (1898-1936) estis barcelona anarkiistino, edziĝinta al aragona intelektulo Ramón Acín (1888-1936). Danke al premiita loteria bileto, ili financis la filmon *Las Hurdes* de Luis Buñuel. Je la komenco de la milito la faŝistoj kruele murdis ambaŭ. Al ŝi ni dediĉas la kinan programon de la kongreso.



Kapelo Casanoves. En bieno de salesianoj de Don Bosco kompreneble enestas kapelo, kiun ni dediĉas al pastro Manuel Casanoves i Casals (1927-2010). Temas pri la kunfondinto kaj unua prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ fondinto kaj unua prezidanto de la hispana sekcio de Amnistio Internacia.

Tendumado Rebours. Francino Germaine Rebours estis sekretariino de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono. Edziniĝinte al esperantisto Frederic Pujulà i Vallès, konata intelektulo kiu travivis la tranĉeojn de la unua mondmiliton ene de la franca armeo, ŝi iniciatis servon de katalunaj leter-amikinoj al tiumilitaj soldatoj.

Gastejo Viladoms. Jaume Viladoms i Valls (1913-1976) estis pedagogo, sindikatisto kaj socialisto el Sabadell. Suferinte ekzilon kaj malliberejon, li kontraŭis la okazigon de la madrida UK (1968) kun la diktatoro kiel alta protektanto,

kiu ne permesis al ekzilitoj partopreni ĝin. Tial li forlasis UEA, kies delegito li estis, kaj membriĝis en SAT.



Manĝejo Comella. Jacint Comella i Mora (1879-1962) estis desegnisto, pentristo, pioniro de fotografio kaj kino, kiu edziĝis al esperantistino el pli malalta socia klaso, tiel rezignante sian familian heredaĵon. Sekretariis la komitaton por gastigo de aŭstriaj infanoj. Sur lia tombo en Vic enskribiĝis en Esperanto: "Interkompreniĝu kaj amu vin".



Korto Fernández Jurado. Ramón Fernández Jurado (1914-1984) estis politika aktivulo kaj poeto, origine el Andaluzio, aktiva ĉe Kooperativo de Manteksistoj kaj POUM. Vundiĝinte en la militfronto, suferis malliberejon, kie li konatiĝis kun Delfí Dalmau. Poste ekziliĝis. Membro de la Juĝkomisiono de la Internaciaj Floraj Ludoj.

Parkejo Masachs. Domènech Masachs (1891-1965) estis barcelona anarkiisto, kiu en 1926 klopodis murdi la tiaman diktatoron Primo de Rivera pere de ponardo, sed akcidentis sin kun lia aŭtomobilo. Profunde pacisma, Masachs elektis tiun metodon por ne damaĝi iun ne kulpulon. Elirinte malliberejon, li daŭrigis pasie sian taskon kiel afablan instruiston de Esperanto.